

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-12 sendita el Budapeŝto la 25an de marto.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Pandemia kurso de la Monda San-Organizaĵo

En la retejo de la Monda San-Organizaĵo oni nun havas la tradukon al Esperanto de ĝia kurso pri KOVIM-19. Vidu ĉe:

<https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19>

Tio okazis pro komenca kontakto de Adam Eng kaj pro traduka/kunordiga laboro de Herman Deceuninck, helpata de kelkaj aliaj esperantistoj.

Precizigo de informoj pri Ulrich Lins

Ni devas korekti la tekston, kiu aperis en EKO 11 pri la nova libro pri Hector Hodler. Jen la teksto, kiu devis aperi:

Ulrich Lins estas germana historiisto, fakulo pri la historio de la Esperanto-movado. En sia verko La danĝera lingvo li esploras la agojn de diktatorecaj reĝimoj kontraŭ Esperanto tra la dudeka jarcento. La verko estas tradukita en sep lingvojn. Franca traduko estas preparata.

Aliĝu senpage al la Numismatika Asocio

Nia faka asocio por monerkolektistoj invitas novajn membrojn. Temas pri la Esperanto-Numismatika Asocio. Kontaktu ĝin ĉe: bert.boon@skynet.be. EMA. Alkroĉite estas lastatempa numero de ĝia revuo en la PDF-formato.

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- MOS - mojosa
- Kolekti monerojn
- Universitatoj
- Radio disradias
- Gepatra Lingvo
- Dua mojsaĵo

Trilingvaj rezultoj el universitata simpozio

Aperis du libroj el la elektitaj kaj prilaboritaj materialoj de la 5a Interlingvistika Simpozio en la nova eldonserio "Cross-linguistic and Cross-cultural Studies" de la Etnolingvistika Instituto de La Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando.

1. The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej (2020)
2. The Intercultural Role of Esperanto / Interkultura rolo de Esperanto / Międzykulturowa rola esperanta (2021)

Ili estas troveblaj kaj elŝuteblaj en la retejo de la Eldonejo RYS


(<https://wydawnictworys.com>) ĉe Novaĵoj <https://wydawnictworys.com/category/nowosci>

Kelkaj prelegoj de la simpozio rigardeblas en la Youtube-kanalo de la simpozio

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLGDNhxSrlMB-AHJnJumSq9k7Vvnf93Uf>

Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris redaktintoj

Esperanto-radioreklamo - 1892 fojojn



El Hungario nia kolego

Szilvási mesaĝas:

“Daŭrigante malnovan

kutimon, denove ni

mendis **12 sekundan**

radioreklamon por 4

semajnoj en 26 hungariaj

lokaj/regionaj radiostacioj!

Tia radioreklama

kampanjo ne rezultos

aliĝon de centmil homoj al

la sekva Esperanta kurso

– sed **la nuna celo ja**

estas tute ne tio. Laŭ

esploroj de reklam-

psikologoj por atingi aĉet-

decidon aŭ por elformi

pozitivan bildon pri iu produkto oni devas **alpuŝi 8-10-12 fojojn** iun pozitivan informeron al la potenciala onta konsumanto.

Tiu regulo **validas ankaŭ por la sukceso de Esperanto**. Tial estas grave aperigi informerojn pri Esperanto en kiel eble plej variaj komunikaj kanaloj: pagitaj interretaj reklamoj, gazetartikoloj, mencioj en televido, leksikonoj, lernado de Esperanto fare de iu konato, ebleco pri lingvoekzameno, vojaĝaj informeroj, lingvopolitiko (samrajteco, justeco, ktp), insignoj, Eo-emblemoj, interretaj forumoj, mencioj en nacilingvaj fejsbukaj afiŝoj kaj alparoloj, Eo-lingvaj versioj de retpaĝoj, alparoloj sub nacilingvaj retaj gazetartikoloj, ktp... . La nuna radioreklamo estas unu peco en tiu listo, **unu eblo por alpuŝi pozitivan informeron** pri Esperanto al aŭskultantoj.

Ni ne havis eblon elektadi la radiostaciojn, ili estis en la portfolio de la kunlabora reklamagentejo. **Temas pri la FM-stacioj de la urboj Szolnok, Tiszakécske,**

Karcag, Baja, Debrecen, Kisvárd, Dunaújváros, Barcs, Siófok, Fehérgyarmat, Kiskunfélegyháza, Mezőtúr, Szentendre, Szarvas, Gyöngyös, Jászberény, Törökszentmiklós, Szombathely, Nyíregyháza, Székesfehérvár, Miskolc, Lakihegy, Érd kaj Kiskunhalas.

Postnoto SMG: Ĉiuj el tiu urboj provincaj, mezgrandaj kaj tiom etaj, ke mi, kiu iam preskaŭ parkeris la hungaran fervojan horaron, neniam aŭdis pri tri el ili!

Postsekvoj de la Tago de la Gepatra Lingvo

Ĉiujare UEA organizas agadon ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, en februaro. Ĉi-jare la agado de esperantistoj estis aparte sukcesa. UEA mesaĝis pri la Tago jam du semajnojn pli frue, kio ebligis al kunlaborantoj traduki kaj dissendi la mesaĝon per diversaj kanaloj, aldone al la versioj en la angla kaj en la franca. UEA formale sendas al UN kaj Unesko la Eo-takston pere de sia oficejo en Novjorko. Ĉefa aganto por tio estas Humphrey Tonkin, komisiito de UEA pri Rilatoj kun UN. La versioj kaj originalo en Esperanto aperis en anglalingva novaĵletero de la Departamento de Monda Komunikado.

Alia motoro estas Renato Corsetti, eks-prezidanto de UEA aktiva pri i.a. Informado. Corsetti subtenis la diskonigon kaj tradukadon de la mesaĝo de UEA, kaj la afiŝo pri la Tago. Plurajn versiojn de la afiŝo eblas trovi en la Vikio de UEA. Ĝi aperis en almenaŭ 39 lingvoj, pri kio multe laboris la grafikisto Peter Oliver, kiu akiris la fotojn kaj produktis la plurajn versiojn kaj formatojn de la afiŝo (vidu la version en la Suahila). Aldone al la Vikio, ĉiuj afiŝoj estas elŝuteblaj el reta dosierujo pretigita de Mariana Evlogieva el Bulgario.

La komunikado de UEA al UN estis tradukita al almenaŭ 14 lingvoj. La Esperanto-originalo troveblas kiel Gazetara Komunikado de UEA kaj en la retejo UN Esperante, tenata de Rafael Lima. Helpe de Scott Turton, la retejo Esperanto por UN aldone



aperigas la versiojn en la angla kaj franca. Voĉlegita versio fare de la dua Vicprezidanto de UEA, Trezoro, disponeblas en la kanalo UEA Viva ĉe YouTube kaj aliaj versioj estas elŝuteblaj ĉe la Vikio de UEA. La afiŝo aperis en la reta revuo *Esperanto*, ĉe sociaj retoj kaj presite ĉe kelkaj lokoj, ekzemple Zsófia Kóródy en Herzberg am Harz ĝin aperigis en pluraj lingvoj en la informkesto antaŭ la urbodomo de la 'Esperanto-urbo'.

La mesaĝo kaj afiŝo estis dissenditaj al organizoj kaj ĵurnalistoj fare de unuopuloj kaj landaj asocioj en Eŭropo kaj Ĉinio. La prezidantino de Ĉina Esperanto-Ligo, Chen Ji, diskonigis ĝin tra ĉinaj kanaloj kaj ĉe la spacoj Ĉina Fokuso kaj Ĉina Esperanto-Ligo ĉe Facebook. BEL en Rio-de-Janeiro (Brazilo) organizis en la portugala retan debaton inter la universitataj profesoroj Fernando Pita kaj Guilherme Fians kaj loka politikisto Reimont Luiz, sub la temo "Protekto de gepatraj lingvoj kaj la rolo de Esperanto". Menciindas la provoj de parolantoj de minoritataj lingvoj en Pakistano kaj Irano. Jen filmo pretigita de Ĉina Esperanto-Ligo.

<https://www.facebook.com/1753507848248309/videos/282252279997544>

Kiel komuniki la mojosecon de Eo al la mondon?

Esperanto estas mojosa! – *Esperanto is cool!* Jen ekzemplodona kaj mirinda filmo de TEJO, kiu klare montras niajn tutmondecon kaj idealismon.

https://www.youtube.com/watch?v=bPU_JXE1MA

Sekvas bildoj el la retejo de TEJO pri ilia agado: supre pri daŭripovo, sube membrovarbado:



===== vortoj: 970 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.